

Sabine Fiedler

Universität Leipzig, Germanio

Erich-Dieter Krause (1935–2023)

Recenza nekrologo

Resumo: Mallonge post la aperigo de la plej ampleksa vortaro de Esperanto iam ajn publikigita forpasis ĝia aŭtoro, la renoma leksikografo Erich-Dieter Krause. Ĉi tiu kontribuajo kaj nekrologe honoras profesoron Krause pro lia enorma leksikografia verko kaj recenzas liajn plej novajn kaj plej enhavoriĉajn vortarojn Esperanto-Germana kaj Germana-Esperanto.

Ŝlosilvortoj: Erich-Dieter Krause; Esperanto-vortaroj

Je la 18-a de oktobro 2023 mortis la longjara membro de la Redakta Komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies*, la elstara germana leksikografo prof. Erich-Dieter Krause. Li estis konata specialisto pri la indonezia lingvo (Bahasa Indonesia), kiu laboris ĝis la jaro 2000 en la Orientazia Instituto de la Universitato Leipzig (Germanio). Al la evoluo de esperantologio, antaŭ ĉio sur la tereno de leksikografio, li faris grandan kontribuon per la verkado de ampleksaj dulingvaj vortaroj por la germanlingvaj landoj.

Erich-Dieter Krause naskiĝis la 12-an de aprilo 1935 en la saksa urbo Auerbach/Vogtland. Post sia studado de sinologio kaj indoneziistiko en la Universitato Leipzig kaj plurjara aldona studado de biblioteka scienco en Humboldt-Universitato Berlin li laboris dum 16 jaroj kiel fakulo pri Aziaj Sciencoj kaj Anglistiko en la Universitata Biblioteko Leipzig. Dum la jaroj 1960 ĝis 1968 li estis interpretisto kaj tradukisto, unue por la angla lingvo en Birmo kaj poste en Indonezio por Bahasa Indonesia kaj la angla. Li daŭrigis sian laboron en la Universitata Biblioteko Leipzig en 1968 kaj estis ties vicdirektoro de 1977 ĝis 1979.

En 1974 Erich-Dieter Krause doktoriĝis pri la temo “Fremdaj influoj al la leksiko de la indonezia kun speciala fokuso pri angloamerikaj influoj” kaj ekde 1979 ĝis la emeritiĝo li laboris en la nuna Orientazia Instituto de la Universitato Leipzig, kie li respondecis pri instruado kaj esplorado en la fako Indoneziistiko. En 1992 Erich-Dieter Krause habilitiĝis per studo sub la titolo “Kontribuoj al priskribo kaj instruado de la indonezia lingvo (Bahasa

Indonesia) – indoneziistiko en la lumo de aplikata lingvistiko” kaj fariĝis profesoro pri indoneziistiko en 1995.

Erich-Dieter Krause publikigis lernolibrojn kaj vortarojn pri la indonezia lingvo. Liaj artikoloj en fakaj ĵurnaloj okupiĝas pri lingvaj influoj al Bahasa Indonesia, ekzemple de la japana (1979), la nederlanda (1981), la portugala (1983) kaj la ĉina (1989). Li parolis dum internaciaj kongresoj pri leksikografiaj demandoj kaj propraj nomoj en la indonezia lingvo. Aldone Krause publikigis artikolojn pri esperantologiaj temoj, interalie en la revuo *der esperantist*, por kiu li recenzis multajn librojn, ĉefe Esperanto-vortarojn. Kiel membro de la fakrondo pri esperantologio en la Centra Estraro de la Esperanto-Asocio de GDR kaj de la Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL) li parolis pri sia laboro kiel Esperanto-leksikografo (la lastan fojon en 1997 en Berlino).¹ Ekde 1986 li estis membro de la Akademio de Esperanto.

Erich-Dieter Krause estas konata, precipe en germanlingvaj landoj, kiel leksikografo pri Esperanto. Lia unua vortaro Esperanto-Germana aperis en 1967 (190 paĝoj) kaj en 1971 aperis lia poŝvortaro Germana-Esperanto (279 paĝoj). Ekde tiu tempo li kontinue plivastigis sian leksikan kolektaĵon por publikigi pli grandajn dulingvajn Esperanto-vortarojn en entute kvar eldonejoj (Enzyklopädie en Leipzig, Langenscheidt en Stuttgart, Buske en Hamburg, Mondial en New York). Ĉe Mondial aperis lia duvoluma vortaro *Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch / Plena Vortaro Esperanto-Germana* (1.512 paĝoj) en 2018 kaj en 2023, nur malmultajn monatojn antaŭ lia morto, tie estis publikigita lia trivoluma verko *Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto / Plena Vortaro Germana-Esperanto* (2.511 paĝoj). Tiuj du vortaroj ne nur enhavas unuopajn kapvortojn kaj kunmetaĵojn, sed multegajn ekzemplofrazojn, terminojn (precipe el medicino, zoologio kaj botaniko) kun klarigoj kaj parolturnoj. Ili estas samtempe ĝenerallingvaj vortaroj, fakvortaroj, frazeologiaj kaj enciklopediaj vortaroj.

Por adekvate honori la kontribuon al Esperanto-leksikografio farita de Erich-Dieter Krause ni rigardu tiujn du lastajn verkojn, kiuj ja prezentas la kulminon de lia laboro, iom pli detale. Ĉar la *Plena Vortaro Germana-Esperanto* (2023) estas sufiĉe freŝdata kaj la utileco de vortaro ofte montriĝas nur post longtempa uzado, kaj por ke la taksado ne estu tro subjektiva, mia analizo baziĝu sur kelkaj kriterioj, kiuj estas aplikataj sur la tereno de privortara kritiko. Laŭ Annalena Hütsch (2017) prijuĝo pri dulingvaj vortaroj ĉefe rilatu al la sekvaj ecoj: *makrostrukturo, mikrostrukturo, mezostrukturo, kadrostrukturo, prezentado, leksikografia procezo, komparo kun aliaj vortaroj kaj resuma pritaksado rilate al aĉetindeco.*

1 Pli detala listo de publikigaĵoj de Erich-Dieter Krause troviĝas en artikolo verkita de Detlev Blanke (2015), kiu aperis okaze de la 80-jariĝo de Krause.

Se temas pri la *makrostrukturo*, taksado de la vortaroj de Krause facilas. Ili estas veraj grandvortaroj. Je iliaj dorsoflankoj ni legas, ke la leksika materialo en *Plena Vortaro Esperanto-Germana* kun 150.000 unuoj “konsiderinde superas tiun prezentitan en la *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, la aktuala unulingva normverko por Esperanto” kaj ke la *Plena Vortaro Germana-Esperanto* en tri volumoj “enhavas pli ol 250.000 leksikajn unuojn (t.e. kapvortoj, vortkunmetoj, parolturnoj) kaj konsekvence estas la plej ampleksa dulingva Esperanto-vortaro iam ellaborita en la mondo”.

Nomi vortaron “plena” estas postuleme kaj certe estis influita de la leksikografiaj tradicioj de Esperanto, laŭ kiuj vortaroj enhavas tiun epiteton en la titolo (*Plena Ilustrita Vortaro*, PIV, Waringhien ĉefred. 1970/2020), ne laste por esprimi la normkonforman karakteron de la enhavo. Dulingvaj vortaroj, precipe de la direkto etnolingvo-Esperanto ne povas esti plenaj, eĉ ne je la fiksita eldondato, ĉar neniu parolanto aŭ vortaristo kapablas scii ĉiujn vortojn de sia lingvo. Specialisto pri ekleziaj aferoj ekzemple verŝajne vane serĉas multajn esprimojn, kiuj estas ĉiutagaĵoj por li aŭ ŝi, same la ŝatanto de kuirarto aŭ de diversaj sportaj disciplinoj k.s. Mia persona hazarda serĉo ekde la eldono de la vortaroj estis sukcesplena, kvankam mi bezonis parte sufiĉe strangajn vortojn aŭ esprimojn, kiel *Wärmepumpe* ‘varmopumpilo’, *nachtragend sein* ‘tute ne emi pardoni’, *Bubble Tea* ‘bobelteo’, *Bitcoin* ‘bitmono’, *Mürbeteigboden* ‘murba tortofundo’ aŭ *Klatschmohn* ‘kampa papavo’. Kiam ni serĉas iom pli laŭsisteme, ni diru, la neologismojn de la 2000aj jaroj publikigitajn de la Instituto pri la Germana Lingvo, la rezulto estas iom pli seniluziiga, ĉar mankas ekvivalentoj por *Influencer*, *Like*, *Bufdi* aŭ *Gendersternchen*.²

En la vortaroj de Krause abundas faka leksiko, speciale el la disciplinoj botaniko, zoologio kaj medicino. Oni povus demandi sin, ĉu termino kiel *Kreodonten* ‘kreodontoj’, *Lissamphibia* ‘lisamfibioj’ aŭ *Nosemaseuche* ‘nozemozo’, pri kiuj multaj en sia gepatralingvo eĉ neniam aŭdis, estu enlistigita en Esperanto-vortaro. Tamen, kiam ni sekvas la informpetojn al la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto dum la pasintaj jaroj, ni rimarkas, ke tiuj speciale rilatis al terminoj. Rigardu la sekvajn ekzemplojn:

DEMANDO [2022-02-04]

Mi ne trovis tradukon por *Tropaeolum peregrinum* (planto) kaj por *Crenilabrus mediterraneus* (fiŝo).

2 *Influencer(in)* (eble *influanto*): persono, kiu estas konata en sociaj retoj perante opiniojn kaj varbmesaĝojn; *Like* (eble *ŝato*): pozitiva prijuĝo donita en sociaj retoj; *Bufdi*: mallongigo de *Bundesfreiwilligendienst* (Federacia Volontula Servo) kaj de persono laboranta en ĝi; *Gendersternchen* (eble *genra asterisko*): asterisko inter la radika aŭ vira formo de vorto kaj la ina sufikso (ekz. *Student*in*), kiu havas la funkcion esprimi lingvan egalrajtecon.

DEMANDO [2020-10-22]

Ĉu estas preferinde uzi radikon hemerokalid/o (rekomenditan de PIV) aŭ pli malnovan formon “hemerokal/o”, uzatan en Vikipedio?

En ambaŭ okazoj la vortaroj de Krause povas helpi. Rilate la unuan demandon ni trovas *kanaria tropeolo* (nomo de la planto) kaj *labro* (nomo de la fiŝo), kaj la aspekto kaj vivmaniero de la fiŝo aldone estas priskribita: “zu den Barscharten gehörende, Brutpflege betreibende Fische mit wulstigen Lippen, die vorwiegend wärmere Meere bewohnen” ‘fiŝoj, apartenantaj al la specio de perkoj, kiuj faras kovlaboron kaj havas dikajn lipojn kaj prefere vivas en varmaj maroj’ (Krause 2023, 1271). Rilate la duan demandon la vortaroj (Krause 2018; 2023) prezentas ambaŭ variantojn (*hemerokal[id]o*) kaj krome informas pri la ĝenerala nomo de la planto (*taglilio*). Menciindas, ke en la vortaroj ĉiuj terminoj estas akompanataj de la latinoj nomoj, kio subtenas precizecon kaj unuecan uzadon.

La vortaroj de Krause ne nur impresas pro la faklingva enhavo. Ili krome estas riĉaj je parolturnoj. Ties tradukoj ja prezentas specialan defion en internacia parolkomunumo. Ĉi-rilate jam la unua artikolo en la *Plena Vortaro Germana-Esperanto*, konvinkas, kiu enhavas ne malpli ol tri frazeologiaĵojn de la germana:

1A *n* Mus La; A-Dur La-maĵora; der Buchstabe A la litero A; **das** ~ **und** [**das**] O la alfo kaj [la] omego ◊ **von A bis Z** vom Ersten bis zum Letzten la tuta gamo; **wer** ~ **sagt, muss auch B sagen** kiu levis la piedon, devas ekpaŝi / se vi prenis la violon, prenu ankaŭ la arĉon (*beide: Zam*)

Entute en la vortaroj alternas unu kun la alia Zamenhofaj esprimoj (ekz. *laŭdu tagon nur vespere* por *Man soll den Tag nicht vor dem Abend loben*) (Krause 2023, 2053) kaj lertaj nefrazeologiaj esprimoj (ekz. *teni ion en bona ordo* por *etwas in Schuss halten*) (Krause 2023, 1855).

Koncerne la *mikro-* kaj *mezostrukturojn* montriĝas la faklerto de la leksikografo. Ni ne forgesu, ke tradukeraroj okaze de plursencaj vortoj ofte ekestas, ĉar uzanto tro rapide kontentas pri la unua vorto ofertata. Ĉi-rilate Krause laboras plurmetode. Unue, la aŭtoro listigas homonimojn en diversaj artikoloj markante tion per superaj indicoj, kiel ekzemple okaze de ¹*Schimmel* (blanka ĉevalo) kaj ²*Schimmel* (ŝimo). Krome li emfazas diklitere diversajn sencojn de la sama vorto. Ekzemple ĉe la vorto *abfallen*: **a)** (*de*)*fali*, **b)** *malsupreniĝi, descendi*, **c)** *sin deturni*, **d)** [...]. Aldone okazas diferencigo de la unuopaj signifoj helpe de parafrazo kaj finfine la aŭtoro montras la diferencojn pere de kuntekstaj indikoj (ekz. *Laub* ‘folioj’, *Obst* ‘fruktoj’; *Straße* ‘strato’, *Wasserspiegel* ‘akvonivelo’ ktp.). Krome helpas al uzanto

multaj gramatikaj atentigoj, ekz. ĉe *afiŝi*: [*ke dass*] (Krause 2018, 17) kaj en la artikolo *Abertausende*: miloj kaj miloj [*mit nachfolgendem da 'kun sekvanta da'*] (Krause 2023, 8).

La referenca strukturo estas unueca kaj facile komprenebla: Referencoj al pli kutime uzataj vortoj estas markitaj per signo de egaleco (ekz. *Erdmittelalter = Mesozoikum*) kaj sagoj montras sinonimojn, ĉe kiuj la tradukoj troviĝas (ekz. *Egli* ↑ *Flussbarsch* 'rivera perko'), aŭ specifajn subspecojn (ekz. *Balsam* 'balzamo' ↑ *auch Lippen-* 'lipobalzamo').

Kiel kutime tildoj (~) estas uzataj anstataŭ jam menciitaj kapvortoj en kunmetaĵoj aŭ parolturnoj por ŝpari spacon (ekz. *Flug, ~platz; die Zeit verging wie im ~e* 'la tempo pasis rapidege'). Entute, tamen, la motivo ŝpari spacon ne vere estas karakterizaĵo sentebla en la vortaroj, el kio la uzanto kompreneble profitas.

Menciindas antaŭ ĉio la multaj rekomendoj je la fino de artikoloj konsulti artikolojn pri simila leksiko, kiuj – kompareble al sinonima vortaro – povas helpi al uzanto trovi la vere ĝustan aŭ pli trafan esprimon en certa situacio. Tiel ekzemple post la vorto *stoisch* 'stoika' sekvas la indiko "vgl. dazu auch gleichmütig" 'komparu pri tio ankaŭ *gleichmütig*', kie ni trovas *egalanima* kaj *sinreganta* kaj post plia referenco *tute trankvila/animtrankvila*.

Per la kriterio de la *kadrostrukturo* Hütsch rilatas al aldonaj tekstoj. El tiuj nur malmultaj ekzistas en la vortaroj de Krause. La aŭtoro rezignas pri enkonduko al la lingva sistemo de Esperanto (diference de ekzemple Wells 2010). Post unupaĝa enkonduko en la germana kaj en Esperanto ni trovas detalajn klarigojn pri la uzo de la supre menciitaj simboloj, manieroj de emfazado kaj strukturo de la artikoloj. El alia perspektivo ĉi tie manifestiĝas la amplekso de la vortaroj: Ili ne nur enhavas esprimojn en la diversaj variantoj de la germana (la aŭstria kaj svisa), sed krome konsideras plurajn stilajn ebenojn de la lingvo, montritajn per indikiloj kiel <umg> "umgangssprachlich" 'ĉiutaga lingvo' aŭ <wiss> "wissenschaftlich" 'scienca'.

Al longa listo pri uzitaj mallongigoj sekvas superrigardo pri leksikografiaj kaj lingvistikaj verkoj, kiuj estis uzitaj de la aŭtoro. La listo enhavas multajn kolektaĵojn, glosarojn kaj antaŭ ĉio fakvortarojn. Surprizis min iomete, ke la kolektaĵo "Komputeko" (Nevelsteen 2012) ne estas menciita, ĉar ne malofte hodiaŭ la traduko de leksiko sur la terenoj informteknologio kaj elektronikaj komunikiloj kaŭzas tradukproblemojn. Sed dum uzado de la vortaro de Krause (2023) montriĝas, ke ĝi helpas ankaŭ ĉe tradukado de esprimoj kiel *Fake News, Instagram, Blogger, Darknet* aŭ *im Homeoffice arbeiten: falsnovaĵoj, instagramo, bloganto, nigra reto, telelabori*. Kelkajn novkreaĵojn ĉi-rilatajn mi tamen ne trovis: *Crowdfunding, Powerbank, Selfie* kaj *Shitstorm*.

La informoj pri uzitaj vortaroj kaj tekstoj tre gravas, ĉar ili montras la bazon de la leksikografia laboro de Erich-Dieter Krause. Kvankam li ĉiam

laboris sola, lia kompilado prenas la laboron de aliaj en konsideron baziĝante sur gamo da fakvortaroj, la lingvouzo de la komunumo ene de kaj ekstere de Eŭropo kaj krome, almenaŭ parte, la proponojn de kritikantoj en recenzoj (kp. Desmet' 2007; Sandel 2023).

Gravan rolon por la uzanto ludas la *presentado* de la leksika materialo, t.e. la tipografio kaj la paĝostrukturo. La vortaroj eldonitaj de Mondial ĉirilate plaĉas pro la sufiĉe grandaj literoj kaj la subdivido al du kolumnoj. Pro la diklitera preso uzita por la ĉefaj unuoj, dikkursiva preso por parolturnoj kaj kursiva preso por klarigoj kaj komentoj kune kun la alineoj de unuopaj artikoloj la *presentado* estas klara kaj unuoj estas facile troveblaj. Al bona legebleco krome kontribuas unueca uzado de krampoj (ekz. rondaj por gramatikaj indikoj kaj variantoj, rektaj por prononcado kaj eblaj ellaso kaj pintaj por la lingvouzo en Aŭstrio kaj Svislando). Kritikinda aspekto estas la *presentado* de elparolado pere de diversgrandaj IPA-signoj en la *Plena Vortaro Germana-Esperanto*, kiujn mi cetere rigardas superflujaj, ĉar uzanto, kiu serĉas germanan vorton el fremdlingvo (ekz. *Jus aŭ Tranquilizer*) ja verŝajne scias la prononcadon de tiu vorto.

Kiel verŝajne ĉiu inter ni jam mem spertis, libro sen preseraroj ne ekzistas. Feliĉe ili maloftas en la vortaroj. En Krause (2018, 50) troviĝas germanaj kapvortoj anstataŭ la esperantlingvaj (okaze de *Amalgam, Amalgamation, amalgamieren, Amalgamschiene*); en Krause (2023) mi hazarde trovis la jenajn: *als es auf den Abend zu ging* → *zuging* (Krause 2023, 6), *drittgrößte Stadt* (Krause 2023, 7), *mit der [...] eine Gefühlsäußerung widergegeben werden kann* → *wiedergegeben* (Krause 2023, 551) kaj la duoblan mencion de *Electronic Banking* (Krause 2023, 543, 545).

Sub la titolo *leksikografia procezo* ofte priskribiĝas specialaj kondiĉoj rilate al la ekesto de vortaro aŭ al la aŭtoro. Ĉi-rilate mi jam menciis, ke Erich-Dieter Krause kiel solisto dum pli ol ses jardekoj dediĉis sin al la kompilado kaj plivastigado de Esperanto-vortaroj. Laŭ mi li ne nur sukcese majstris iri la vojon de la verkado de poŝvortaroj al grandvortaroj, sed krome devis trapaŝi la kunligitan evoluon de kolektado pere de paperaj katalogslipoj al la perkomputila kompilado.

Eble tio estas ankaŭ la loko por mencii la specialan karakteron de la lingvo, pri kiu Krause okupiĝis dum sia tuta vivo. Por siaj planlingvaj verkoj li verŝajne ne ricevis la saman rekonon kiel por siaj libroj pri la indonezia lingvo. La Esperanto-komunumo estas malgranda kaj kritikema kaj speciale koncerne vortarojn ĉiu parolanto de la lingvo fariĝas fakulo, kiu seniluziiĝas ne trovinte la ĝustan vorton por traduko. Ekstere de la parolkomunumo ĝis la hodiaŭa tago abundas homoj, kiuj ne konsideras Esperanton vera lingvo. En tiu kunteksto la vortaroj de Krause ludas gravan rolon. Diference de la ĝenerala planlingva literaturo, ili ne nur vendiĝas

rete kaj dum Esperanto-kongresoj. Ni trovas ilin en landaj bibliotekoj kaj renomaj librovendejoj apud la etnolingvaj vortaroj. Altkvalita dulingva vortaro en tri volumoj kun pli ol 250.000 leksikaj unuoj parolas por si mem kaj posedas krom sia praktika ankaŭ prestiĝan valoron kaj helpas plialtigi la reputacion de Esperanto ekstere.

Kiam ni serĉas materialon taŭgan por *vortara komparo*, sin proponas tiuj por la itala (Minnaja 1996) kun 1.438 paĝoj kaj la hispana (de Diego 2003) kun 1.279 paĝoj kaj 51.000 artikoloj, kiuj same enhavas grandnombre fakan leksikon kaj parolturnojn. Bedaŭrinde mankas al mi la lingvokonoj por tia komparo. Kio eblas, tio estas komparo inter unu el la plej novaj vortaroj kaj ties antaŭulo por respondi la demandon kiamaniere okazis la pligrandigo. La plej freŝdata vortaro (Krause 2023) kun siaj 2.511 paĝoj kaj pli ol 250.000 unuoj prezentas konsiderindan kreskon kompare al la vortaro de Krause (2007), aperinta en la eldonejo Buske, kiun ni sekve pli detale ekzamenos rigardante la enhavojn por la litero K.

	Krause (2007)	Krause (2023)
Nombro de paĝoj (litero K)	102 (pp. 709-810)	162 (pp. 1046-1207)
Nombro de artikoloj	4093	5575

Tabelo 1: Komparo de la vortaroj Krause (2007) kaj Krause (2023) laŭ nombro de paĝoj kaj artikoloj

Kiel tabelo 1 montras, plialtiĝis la nombro de artikoloj, t.e., novaj leksikaj unuoj estis aldonitaj. Dume ke en Krause (2007) al la vorto *kernig* ‘kerna’ sekvis *Kernkraft* ‘nuklea energio’, en Krause (2023) troviĝas inter tiuj du vortoj la terminoj medicina *Kernkatarakt* ‘centra katarakto’ kaj ornitologia *Kernknacker* ‘dikbekulo’, la laste menciita kun referencoj al du reprezentantoj de la specio, nome *Rosenbrustkernknacker* kaj *Schwarzkopfkernknacker*. Aliaj aldonaj artikoloj estas kaŭzigitaj de la kreskanta scio en medicino kaj tekniko kaj al la grado, je kiu tiu influas nian ĉiutagan vivon, ekz. *Kariesprophylaxe* ‘kariopreventado’, *Karpaltunnelsyndrom* ‘karooptunela sindromo’ aŭ *Kernspintomografie* ‘magneta resonanca tomografie’.

Krome estis aldonita kaj en Krause (2018) kaj en Krause (2023) grandnombro da propraj nomoj, t.e. esperantigitaj formoj (kiel ekz. *Dubĉeko*, *Pasternako*; *Karin*, *Karla*, *Karola* ktp.). Mi ne certas, ĉu tio vere estas plusa valoro. La temo ja estas multe pridiskutata en Esperanto kaj finfine al tradukisto oni nur povas konsili uzi proprajn nomojn en la originala (t.e. etnolingva) formo aŭ aldoni tiun al la esperantigita. Ja neniam eblas listigi ĉiujn proprajn nomojn kaj ĉiu elektado estas subjektiva. Mi persone rilate al Krause (2023) povus rezigni pri la esperantigitaj formoj por *Karlsruhe* kaj *Karlstad* kaj prefere trovintus *Meißen* kaj *Meißner Porzellan*.

La pli granda amplekso de la *Plena Vortaro Germana-Esperanto* krome estas atribuata al pliriĉigo de jam ekzistantaj artikoloj. Troviĝas pli multaj referencoj al pli specifaj esprimoj (ekz. ĉe *Karies* ‘kario’ al *Wurzelkaries* ‘[dent]radika kario’ aŭ ĉe *Kabel* ‘kablo’ al *Antennen-* ‘antena’, *Erd-* ‘subtera’, *Fernseh-* ‘televida’, *Glasfaser-* ‘vitrofibra’ kaj aliaj specoj) kaj ekzemplaj frazoj (ekz. ĉe *kärglich* ‘malabunda’: *nur eine kärgliche Rente bekommen* ‘ricevi nur magran pension’).

Aldone, la kvanto de fonaj informoj ene de la artikoloj pligrandiĝis (vd. tabelon 2).

Informoj pri	Krause (2007)	Krause (2023)
kulturaj tradicioj	Karneval <i>m</i> , auch <i>Fasching m</i> karnavalo; ~ <i>feiern</i> festi karnavalon (p. 725)	Karneval <i>m</i> , auch <i>Fasching m</i> karnavalo (<i>Zus</i> ↑ auch unter <i>Fasching</i>); ~ <i>der</i> <i>Kulturen</i> Karnavalo de la Kulturoj <seit 1996 alljährlich in Berlin-Kreuzberg um <i>Pfingsten</i> > (‘ekde 1996 ĉiujare en Berlin Kreuzberg je Pentekosto’); ~ <i>feiern</i> festi karnavalon
lingvo	Karlsbrücke <i>f</i> in Prag Karola Ponto (p. 724)	Karlsbrücke <i>f</i> , <i>tschech.</i> <i>Karlův most</i> in Prag Karola Ponto <1357 <i>errichtet</i> >
historio kaj geografio	Karnataka (<i>n</i>), früher Mysore (<i>n</i>) ein <i>ind. Unionsstaat</i> Karnatako, früher Majsurio (p. 725)	Karnataka (<i>n</i>) früher [bis 1973] Mysore (<i>n</i>) ein <i>indischer Unionsstaat</i> an der SW- Küste Vorderindiens Karnatako, früher Majsurio [Hptst.: Bangalore]
karakterizaĵoj kaj uzado	Karotinoide <i>n/Pl</i> , auch <i>Carotinoide</i> <i>n/Pl Biochemie</i> karotenoidoj <i>Pl</i> (p. 725)	Karotinoide <i>n/Pl</i> , < <i>wiss</i> > <i>Carotinoide</i> <i>n/Pl Biochemie</i> (eine umfangreiche Klasse gelber u. roter Naturfarbstoffe, <i>chemisch hochungesättigte</i> <i>aliphatische</i> u. <i>aliphatisch-alizyklische</i> <i>Kohlenwasserstoffe</i> u. <i>deren</i> <i>Oxidationsprodukte</i> karotenoidoj (‘ampleksa klaso de flavaj kaj ruĝaj naturaj kolorsubstancoj, kemie altgrade nesaturitaj alifataj kaj alifataj-aliciklaj hidrokarbonoj kaj iliaj oksidiĝproduktoj’) <i>Pl</i> (vgl. dazu <i>Lycopin</i>) < <i>einige Carotinoide</i> <i>sind als Lebensmittelzusatzstoffe</i> <i>zugelassen</i> > (‘kelkaj karotenoidoj estas permesitaj nutraĵoaldonaĵoj’)

Tabelo 2: Komparo de la vortaroj Krause (2007) kaj Krause (2023) laŭ fonaj informoj

Kiel tiuj malmultaj ekzemploj jam montras, la nova vortaro estas samtempe klariga fakvortaro, ja oni povas eĉ paroli pri leksikono aŭ enciklopedio.

Se temas pri *resuma prijuĝo* de la vortaroj de Krause (2018; 2023), ni povas konstati, ke ili estas rekomendindaj, ĉar ili prezentas la plej bonajn rezultojn de faklerta leksikografia laboro de Esperanto. Ili estas praktike utilaj por germanaj parolantoj de plej diversaj niveloj de lingvokapablo kaj je la fono de la evoluinta plurlingveco de multaj Esperanto-parolantoj interesa elirpunkto por lingvolernado kaj komparaj studoj. Ni ne forgesu la aron de lingvoentuziasmoj, kiuj abundas inter Esperanto-parolantoj: Ili ekzemple povas profiti el la riĉa stoko de konataj Esperantaj frazeologiaĵoj, kiujn Krause (2018) enhavas kune kun kulturspecifaj ekvivalentoj aŭ elegantaj germanaj tradukoj (vd. ekz. *Mankas klapo en ies kapo – jemand hat nicht alle Tassen im Schrank* ‘iu ne havas ĉiujn tasojn en la ŝranko’).

Aldone, la laboro de Krause permesas al ni enrigardon en la leksikan evoluon de la planlingvo. Kiel Tonkin (2015, 196) substrekas, vasta plejmulto de la Esperanto-leksiko estis kreita de la parolantoj de la lingvo, ne de la iniciatoro, kaj je kiu grado la esprimriĉeco kreskis, tion montras tiuj vortaroj. Esperanto taŭgas kiel ĉiutaga komunikilo por diversaj stilaj ebenaĵoj same kiel lingvo de beletro kaj de faka komunikado.

La vortaroj Esperanto-germana kaj germana-Esperanto finfine multon eldiras pri la karaktero de la du lingvoj. Al lingve interesitaj Krause (2018) montras, ke homonimoj tute ne estas tiel raraj kiel oni pensas (vd. ekz. la artikolojn *aktinio* aŭ *talo*) kaj ke la formado de signifohavaj akronimoj (ekz. *EToSo*, *AFER*, *AME*, *EMAS*) estas same populara en Esperanto kiel en aliaj lingvoj. Rilate al la germana, Krause (2023) ekzemple spegulas la trajton, kiomgrade la lingvo estas nuntempe influata de elpruntaĵoj el la angla. Tiamaniere per siaj vortaroj Krause ne nur verkis praktikajn helpilojn, lia laboro kontribuis al priskribo de la germana kaj ĉefe de la planlingvo.

Ĉar ni nun ne plu vivas en la tempo de grandegaj paperaj vortaroj, menciindas, ke la vortaro de Krause (2018) ankaŭ haveblas en elektronika versio kaj Krause (2023) forme de PDF, kiuj ne nur estas pli malmultekostaj, sed ankaŭ donas la eblecon de rapida vortserĉado. Reta aliro, kiel en okazo de *PIV* kaj la du supre menciitaj dulingvaj vortaroj, estus dezirinda ankaŭ por la verkoj de Krause, same kiel la daŭrigo de lia laboro en la sama altkvalito fare de posteuloj.

Ni ŝuldas al Erich-Dieter Krause grandan dankon. Pro tio, ke li aplikis sian faklerton kiel leksikografo pri la indonezia al Esperanto dum sia profesia vivo kaj ke li daŭrigis tiun laboron nelacigeble dum jardekoj post sia emeritiĝo. La uzantoj de liaj vortaroj same kiel liaj esperantologiaj kolegoj ankaŭ estonte altestime kaj honore rememoros lin.

Bibliografio

Recenzitaj verkoj

- Krause, Erich-Dieter. 2018. *Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch / Plena Vortaro Esperanto-Germana*. Vol. 1–2. Novjorko: Mondial.
- Krause, Erich-Dieter. 2023. *Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto / Plena Vortaro Germana-Esperanto*. Vol. 1–3. Novjorko: Mondial.

Menciitaj verkoj

- Blanke, Detlev. 2015. "Erich-Dieter Krause zum 80. Geburtstag." *Interlinguistische Informationen* 24, kajero 94–95: 11–14. https://media.interlinguistik-gil.de/inti/IntI_94-95_1-2_2015.pdf (18.04.2024).
- de Diego, Fernando. 2003. *Gran Diccionario Español-Esperanto*. Santandero: mag.
- Desmet', Petro. 2007. "La dika Krause?... kredu min, sinjorino!" *Monato* 28, kajero 10: 23–24. <https://www.monato.be/2007/pdf/monato200710.pdf> (18.04.2024).
- Hütsch, Annalena. 2017. "Wörterbuchkritik zu allgemeinen zweisprachigen Wörterbüchern." En *Wörterbuchkritik / Dictionary Criticism*, redaktis Monika Bielińska kaj Stefan J. Schierholz, 303–322. Berlin: de Gruyter.
- Krause, Erich-Dieter. 1967. *Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch*. Leipzig: Enzyklopädie.
- Krause, Erich-Dieter. 1971. *Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto*. Leipzig: Enzyklopädie.
- Krause, Erich-Dieter. 2007. *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto*. Hamburg: Buske.
- Minnaja, Carlo. 1996. *Vocabolario italiano-esperanto*. Milano: CoEdEs.
- Nevelsteen, Yves. 2012. *Komputeko. Prikomputila Terminokolekto*. 2-a eld. Partizánske: E@I.
- Sandel, Jan P. 2023. "Ĉu surprizas, ke solisto ne inklinas al kunlaboro de orkestro?" *Beletra Almanako* 17, kajero 48: 112–122.
- Tonkin, Humphrey. 2015. "Language planning and planned languages: how can planned languages inform language planning." *Indecs* 13, kajero 2: 193–199. <https://doi.org/10.7906/indecs.13.2.1> (18.04.2024).
- Waringhien, Gaston, ĉefred. 1970. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Nova eld. 2002, 2020, kunordigita de Michel Duc Goninaz kaj K. Roux. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda. <https://vortaro.net> (18.04.2024).
- Wells, John C. 2010. *English Esperanto English Dictionary*. New York: Mondial.

Pri la aŭtoro

Sabine Fiedler estas emerita profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Leipzig (Germanio). Ŝi doktoriĝis en 1986 per disertacio pri angla faklingvo kaj habilitiĝis en 1999 en ĝenerala lingvistiko per studo pri la frazeologio en planlingvoj. Ŝiaj esplorteroj estas frazeologio, interlingvistiko/planlingvoj, komunikado per lingvafrankao, tradukscienco kaj humurstudoj.

Retadreso: sfiedler@uni-leipzig.de

ORCID-numero: 0000-0003-4622-3544

About the author

Sabine Fiedler is a retired Professor of Linguistics at the University of Leipzig (Germany). She holds a PhD in English linguistics (1986) and a second degree (Habilitation) in general linguistics (1999). Her research interests include phraseology, interlinguistics/planned languages, lingua franca communication, translation studies and humour research.

Über die Verfasserin

Sabine Fiedler ist Professorin für Sprachwissenschaft im Ruhestand an der Universität Leipzig. Sie hat 1986 mit einer Arbeit zur englischen Fachsprachenforschung promoviert und sich 1999 mit einer Studie zur Phraseologie in Plansprachen habilitiert. Zu ihren Forschungsgebieten gehören Phraseologie, Interlinguistik/Plansprachen, Lingua-franca-Kommunikation, Übersetzungswissenschaft und Humorforschung.

Erich-Dieter Krause (1935–2023): an obituary and review

Abstract: Shortly after the publication of the most comprehensive Esperanto dictionary ever published, its author, the renowned lexicographer Erich-Dieter Krause, passed away. This article is intended both as a tribute to Professor Krause and his outstanding lexicographical work, and as a review of his latest and most comprehensive dictionaries Esperanto-German and German-Esperanto.

Keywords: Erich-Dieter Krause; Esperanto dictionaries

Erich-Dieter Krause (1935–2023): Nachruf mit Rezension

Zusammenfassung: Kurz nach dem Erscheinen des umfangreichsten Esperanto-Wörterbuches, das jemals publiziert wurde, verstarb sein Autor, der bekannte Lexikograf Erich-Dieter Krause. Der vorliegende Artikel soll zugleich ein ehrender Nachruf für Professor Krause und sein herausragendes lexikografisches Werk und eine Rezension seiner neuesten und umfangreichsten Wörterbücher Esperanto-Deutsch und Deutsch-Esperanto sein.

Schlüsselwörter: Erich-Dieter Krause; Esperanto-Wörterbücher